



# Islando kandidatas aliĝi al Eŭropa Unio

## Litovio festas sian jarmilon



## Kelkaj meditoj rilate al „porka gripo”

Edwin de Kock

# Sub Fremdaj Ĉielo

**“Nekutime leginda verko”**

**Donald Broadribb**



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Serio Stafeto n-ro 32  
Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 333 g,  
288 paĝoj, ISBN 978-90-77066-33-1;  
prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko.

Kiel e-libro (PDF): prezo ĉe FEL: 13,50 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

## Kiam Is-lando fariĝas os-lando

11

La islanda parlamento akceptis per minimuma plimulto la kandidatigon



de Islando por aniĝi al Eŭropa Unio (EU). Tiu ĉi novaĵo apenaŭ ricevis atenton en belgaj komunikiloj. Ili nur menciis la fakton sen komentoj. Tamen belgaj EU-parlamentanoj pozitive reagis al tiu ĉi decido, same kiel José Manuel Barroso, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono.

## Sonas la jarmilo

14

En la jaro 1009 unuafoje estis menciita en priskribo pri pereinta misiisto la nomo „Litovio”. La originala dokumento es-



tis verkita en la nord-germana urbo Quedlinburg. El Germanio oni sendis al Litovio kopion de la pergameno de la 11a jarcento, por helpi al la lando celebri en julio sian jarmilon.

## Kelkaj meditoj rilate al „porka gripo”

21

La 11an de junio Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) atribuis al la nuntempa epidemio de „porka” gripo aŭ pli ĝuste al la gripo AH1N1 la plej altan, tio estas la sesan, nivelon (fazo 6). Do, la epidemio disvastiĝis preskaŭ en ĉiuj kontinentoj, t.e. jam okazis pandemio: kreskinta kaj daŭranta transmisio de la infekto inter homoj.



## Ĉu necesas psikologa helpo esperantlingva?

23

Psikologio estas la studado de la mensaj faktoj kaj procezoj, kiuj produktiĝas en rilata kunteksto. La unua celo ekkontakti psikologon – tiel, kiel okazas ĉiam pli ofte per rethelpo – estas la solvo de konkretaj problemoj.



### politiko

|                                      |    |
|--------------------------------------|----|
| Aŭstrio .....                        | 8  |
| Forigo-festo .....                   |    |
| Eŭropa Unio .....                    | 9  |
| Kiam Is-lando fariĝas os-lando ..... |    |
| Belgio .....                         | 10 |
| Kverelas la komunumoj .....          |    |
| Niĝerio .....                        | 11 |
| Mortigoj religiaj .....              |    |
| Ganao .....                          | 11 |
| Obama: For la fortuloj! .....        |    |
| Balkanio .....                       | 12 |
| Vizoj reviziitaj .....               |    |
| Kosovo .....                         | 12 |
| Ĉu interpol-uo? .....                |    |
| Albanio .....                        | 12 |
| Rezulto proporcia .....              |    |

### moderna vivo

|                                   |    |
|-----------------------------------|----|
| Japanio .....                     | 13 |
| Invititoj profesiaj .....         |    |
| Litovio .....                     | 14 |
| Sonas la jarmilo .....            |    |
| Prizonoj .....                    | 16 |
| Pri lokoj kaj mokoĵ .....         |    |
| Aŭstrio .....                     | 17 |
| Kiam akvo trovis la „ŝipon” ..... |    |
| Germanio .....                    | 18 |
| Sango kaj honoro .....            |    |
| Universitatoj .....               | 19 |
| Ekzameno ekzamenata .....         |    |

### scienco

|                                                     |    |
|-----------------------------------------------------|----|
| Servo .....                                         | 20 |
| Ĉu necesas psikologa rethelpo esperantlingva? ..... |    |
| Pandemio .....                                      | 21 |
| Kelkaj meditoj rilate al la „porka gripo” .....     |    |

### ekonomio

|                                    |    |
|------------------------------------|----|
| Eŭropa Unio .....                  | 23 |
| Paŝo al energia sendependeco ..... |    |
| Belgio .....                       | 24 |
| Plimultiĝas dungeblecoj .....      |    |
| Ŝparemaj belgoj .....              |    |

### libroj

|                                                  |    |
|--------------------------------------------------|----|
| La mondevolucia verko finfine en Esperanto ..... | 25 |
|--------------------------------------------------|----|

|                         |    |
|-------------------------|----|
| › Abonoj .....          | 4  |
| › Enkonduko .....       | 5  |
| › Leteroj.....          | 6  |
| › El mia vidpunkto..... | 7  |
| › Anoncetoj.....        | 27 |



## ► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- Per bankĉeko tratis je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto |     | MONATO  |      |       | LA JARO aere |          |
|---------------------|-----|---------|------|-------|--------------|----------|
|                     |     | surface | aere | rete  | 3a klaso     | 1a klaso |
| Argentino           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Aŭstralio           | AUD | 87      | 92   | 52,2  | 9,5          | 15       |
| Aŭstrio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Belgio              | EUR | 49      | 58   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Brazilo             | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Britio              | GBP | 44      | 47   | 26,4  | 5            | 7        |
| Bulgario            | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Ĉeĥio               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Danio               | DKK | 366     | 396  | 219,6 | 41           | 65       |
| Estonio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Finnlando           | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Francio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Germanio (ok.)      | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Germanio (or.)      | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Grekio              | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Hispanio            | EUR | 47      | 51   | 28,2  | 5,5          | 9        |
| Hungario            | HUF | 7400    | 8200 | 4440  | 1500         | 2410     |
| Irlando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Islando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Israelo             | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Italio              | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Japanio             | JPY | 7980    | 8500 | 4788  | 860          | 1200     |
| Kanado              | CAD | 78      | 84   | 46,8  | 9            | 14       |
| Kipro               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Koreio              | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Kostariko           | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Kroatio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Latvio              | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Litovio             | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Luksemburgo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Malto               | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Nederlando          | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |
| Norvegio            | NOK | 430     | 460  | 258   | 48           | 71       |
| Nov-Zelando         | NZD | 105     | 111  | 63    | 11,5         | 18       |
| Pollando            | PLZ | 115     | 126  | 69    | 23           | 36       |
| Portugalo           | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Rusio               | EUR | 25      | 28   | 15    | 5,5          | 9        |
| Serbio              | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Slovakio            | EUR | 27      | 30   | 16,2  | 5,5          | 9        |
| Slovenio            | EUR | 35      | 38   | 21    | 5,5          | 9        |
| Sud-Afriko          | EUR | 43      | 46   | 25,8  | 5,5          | 9        |
| Svedio              | SEK | 499     | 543  | 299,4 | 56           | 84       |
| Svislando           | CHF | 82      | 88   | 49,2  | 9            | 14       |
| Usono               | USD | 78      | 82   | 46,8  | 8            | 13       |
| Baza tarifo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5,5          | 9        |

## ► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-  
ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.  
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,  
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.  
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,  
2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).  
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,  
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.  
Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio  
de Britio, Esperanto House, Station Road,  
Barlston, STOKES-ON-TRENT, ST12 9DE,  
Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,  
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto  
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,  
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.  
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-  
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45  
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-  
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de  
Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530  
Helsinki, Finnlando.  
Reto: eaficejo@esperanto.fi
- **Francna:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,  
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D  
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**  
► Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer  
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering,  
(Commerzbank Hoya, Kontonumero:  
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)  
Reto: robo.espero@acn-mail.de.  
► Hans Dietrich Platz, Postfach 1148, D-34303  
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk  
91856-676 (BLZ 54510067)).  
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.  
► Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang  
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129  
Mainz.  
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,  
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de  
Pensions 2100-0461-90-0200055053).  
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,  
Bakatsu. 1/3 III. l. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9  
Templeogue Wood, Dublin 12.  
Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,  
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.  
Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via  
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:  
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,  
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.  
esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a  
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,  
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro  
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860  
Reto: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,  
1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti  
Duh 130, HR-10000 Zagreb.  
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības  
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371  
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Straznickas, Laimius Straz-  
nickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C,  
Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394  
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111  
0089 3612 0000).  
Reto: esper\_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg  
176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf  
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.  
Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date  
Crescent, Christchurch 8025.  
Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117  
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-  
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV  
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,  
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239  
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- **Ruslandaj:**  
► Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-  
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.  
Reto: sezonoj@gazinter.net.  
► Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006  
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.  
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:  
42301.810.3.0018.0084867.  
Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića  
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.  
+381-63-7200 616. Reto: zcirić@eunet.yu
- **Slovenaj kaj Slovakaj:**  
► Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129  
Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
- **Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,**  
HR-10000 Zagreb.  
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview  
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.  
Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**  
► Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-  
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123  
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.  
esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet  
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35  
Hörby, Svedio.**  
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn  
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7  
Basel. Reto: ch\_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,  
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1  
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

# Psike malsana



**V**i trovos ĉi-numere artikolon de psikologo, kiu proponas al vi novan servon. Li detale klarigas la temon kaj atentigas interalie, ke la parte drastaj ŝanĝoj ligitaj ekzemple kun tutmondiĝo kreis novajn kampojn de psikologio. Sekve de tiuj ŝanĝoj psikaj problemoj de homoj kaj socio ĝenerale havas aliajn, ĝis antaŭ nelonge nekonatajn dimensiojn. La demando estas, ĉu vi, estimataj legantoj, volas konsulti psikologojn, por ke ili eventuale helpu vin pli bone kompreni iujn fenomenojn kaj problemojn. Legu la artikolon kaj decidu, ĉu kaj kiel vi volas eble reagi. Ŝajnas al mi, ke estas interesa iniciato.

En tiu ĉi kunteksto mi revenas al la artikolo de Alexander Gofen pri la usona prezidanto Barack Obama. Multaj el vi prave kritikis ĝin kaj protestis. Iuj opiniis, ke usonanoj kun samaj ideoj estas neglektinda minoritato. Sed intertempe atingis nin multaj raportoj el Usono, kiuj montras, ke tamen ne tiom malmultaj civitanoj de la lando pensas simile al Gofen. Memoru, ke en lia artikolo (en la junia numero) jam en la titolo aperas la riproĉo pri „socialisma aventurismo“ kaj ke enkonduke Gofen sen iuj klarigoj skribis, ke socialismo infektis Usonon kaj ke la nunan ekonomian krizon kaŭzis „la aventurismo de socialismaj elitoj“. Tio estas kurioza aserto, ĉar ne povas esti iu ajn dubo, ke tiun katastrofon

kaŭzis ne socialistoj, sed nure kapitalistoj. Aliflanke estas tute neklare, kiel Gofen kaj kompanoj (sub)komprenas la nocion „socialismo“. Kaj nun tiu ĉi vorto aperas en ĉiuj kritikoj kaj polemikoj de usonanoj, kiuj kontraŭas kaj kondamnas la reformon de la sanservoj en Usono, kiun Obama promesis dum sia elektokampanjo. Lia celo estas simple, ke ĉiu civitano havu minimuman san-asekuron, kiel estas en preskaŭ ĉiuj aliaj industriaj landoj, almenaŭ en Eŭropo. Sed legante la raportojn pri kunvenoj de usonanoj kunvokitaj de politikistoj de la demokrata partio (do tiu de Obama), mi havas la impreson, ke la kontraŭuloj de la reformplano per parte histeriaj reagoj kun la ĉiama riproĉo pri „socialismo“ parte estas psike malsanaj.

Kiel ajn, eble estus interesa tasko por psikologoj esplori tiun ĉi strangan fenomenon en Usono.

Sincere via

*Stefan Maul*

Stefan Maul



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

## ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

## revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.  
Rete: redakcio@monato.net.

## grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

## redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la konkerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.  
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.  
Telefono 440-646-1482.  
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozonojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.  
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna\_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.

Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.  
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.  
Rete: spirita\_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

## Esti usonano aŭ ne (7)

Alexander Gofen ekleviis haladzan proceson, serĉante harojn sur ovojn pri la civitaneco de Obama (MONATO 2009/6, p. 10-12). Eble la usona konstitucio mencias la nocion „hereda, aŭ natura, civitano” (kiel traduki la anglaĵon „*natural*”?). Nur ruĝhaŭtaj indianoj, praloĝantoj de la lando, vere plenigas tiun kvaliton. Ĉiuj blankuloj estas posteuloj de invadintoj, uzurpintoj, kiuj, per genocido, sin instalas tie, aŭ idoj de enmigrintoj.

Mi memoras alian prozaĵon de la sama verkinto el la artikolo *Dio, benu Usonon!* (MONATO 2002/11, p. 9). Ĉiam li emfazas patriotecon kaj kapitalistajn virtutojn kaj montras malamon al komunistoj, socialistoj, islamanoj kaj aliaj anoj de li ĵetitaj en la „damnan malbonakson”, kiun, li kredas, justa milito devus ekstermi. Samopinias *Kranio kaj tibioj*, sekreta societo fondita en 1832, kies emblemo montras kranion super krucitaj tibioj en cirklo. Jes ja, la sama, kiun oni vidis sur naziaj tankoj, kiun oni povas ankoraŭ vidi sur britaj submarŝipoj. Bush (la patro kaj eĉ la filo) konas tiun societon, estante membro de ĝi.

Atentemaj legantoj de MONATO ne donu tro da graveco al tiu klaĉadema verkisto, eble nova usonano, kiu iam sin prezentis, kiel havanton de duobla civitaneco.

Michel MARKO  
Francio

## Kiuj voĉdonis por EDE?

Stefan Maul supozas, ke la elektintoj por EDE estas nur esperantistoj, ties familianoj kaj geamikoj (MONATO 2009/8-9, p. 8). Tio ne veras. Jen du tialoj kontraŭ tiu supozo:

En 2004 mi voĉdonis por EDE, nur pro raciaj argumentoj, ĉar tiutempe mi nur sciis pri la ekzisto de Esperanto, sed konis neniun esperantiston.

En 2009 mi kandidatiĝis por EDE, kaj sekve analizis lokajn rezultojn. En mia departemento ni ricevis 667 voĉdonojn en 2004, kaj 408 en 2009 (tamen en eŭropa

Francio la nombro kreskis el 25 067 ĝis 27 408). En mia urbeto, el ĉirkaŭ 2200 voĉdonintoj EDE ricevis 1 voĉon en 2004 (ne mi, ĉar mi loĝis apud Parizo), kaj ankaŭ 1 ĉi-jare (mi scias, ke estis mi!), tamen multaj homoj tie konas mian esperantistecon. En la najbara urbo, el ĉirkaŭ 6500 voĉdonintoj EDE ricevis 10 voĉojn en 2004 kaj 54 en 2009. Tamen la loka esperantista asocio konas nur unu Esperanto-parolanton en tiu urbo, kiu ne estas politike fama.

Mi konkludas, ke verŝajne estas homoj, kiuj voĉdonis por EDE sen rekte koni esperantistojn, sen eblaj paroli Esperanton. Unu tia estas mia kuzo, kiu diris al mi: „Tre bona ideo! Se vi sukcesos, mi volonte lernos Esperanton.”

Robert Leleu  
Francio

## Ĉu esti aperta por ĉies opinio?

Min ŝokas la respondo de Stefan Maul (MONATO 2009/8-9, p. 5) pri la artikolo („opinio”) de Alexander Gofen. Envere mi atendis de S. Maul, kiun mi taksis eminenta ĵurnalisto kaj ekvilibra honesta persono, simplan respondon: „Jes, ni eraris pro nesufiĉa kontrolo de la faktoj kaj manko de nia distancigo disde tiaj akuzoj.” Punkto. Vidinte, ke neni el ni, homoj, estas senerara, rekoni unu nian evidentan eraron estas honorinda, laŭdinda konduto.

Male li respondas: „... ni devas akcepti, ke tia dekrismo estas reala en nia mondo ... Nia magazino estas aperta por ĉies opinio ... eĉ se ni abomenas ĝin.”

Nu, se tia estas la eldonlinio de la revuo, mi atendas, ke aperos – malavare enpaĝigitaj kaj titolitaj, senaj je ia ajn kritika distancigo – artikoloj asertantaj, ke: la holokaŭsto estas falsa invento, ĝi neniam okazis; la nigruloj estas malpli inteligentaj, ol la blankuloj; la mortopuno necesas por gardi la sociordon; la gejoj estas mensmalsanaj; la torturo necesas por nin defendi de la terorismo; la virinoj devas resti hejme por gardi la infanojn kaj triki ŝtrumpojn; ktp ktp. Ankaŭ

tiuj ĉi pensmanieroj estas ja realaj, eĉ bedaŭrinde amase disvastigitaj en nia mondo. Demokratia, serioza kulturmagazino certe devas averti pri ilia ekzisto, sed certe ne dediĉu al ili, senkomente, tutajn paĝojn!

Ignat Florian Bociort, ĉie konata kiel ekvilibra rezonanto, en la artikolo *Mispaŝo kontraŭ la etiko de la ĵurnalismo*<sup>1</sup> skribas: „Ni ĝuste komprenu la ‘senrespondecon pri la opinioj’, ĉar ĝi ne senlimas: neniun demokratia kaj matura revuo akceptas hodiaŭ artikolojn de naciistoj, rasistoj, aŭ senbazajn blamaĵojn pri laboro aŭ personeco de la homoj. Al tio aldoniĝas, en la E-revuo, la observado de la spirito de Esperanto.”

Se la eldonpolitiko de MONATO konfirmiĝos tia, kia estis ĵus deklarita de s-ro Maul, kun granda bedaŭro mi devos distanciĝi de la revuo kaj certe ne plu aboni ĝin.

<sup>1</sup> En *Esperanto: Movado. Strategio. Estetiko. Rakontoj*, 2007, p. 104.

Sen RODIN  
Italio

## Ĉu esti aperta por ĉies opinio? (2)

Mi malabonis lastan jaron pro tio, ke mi estis maldungita, do min surprizis ricevi, senpage, ekzempleron de MONATO (2009/8-9). Mi rimarkis, ke la leteroj plejparte priprotestas artikolon en la junia numero pri la nova furoro de la usona ekstremdekstro, la (ne)civitaneco de prezidanto Obama. Ĉar mi ne ricevis ekzempleron de la junia MONATO, mi ne povis legi tiun artikolon. Sed, leginte kaj aŭdinte la idiotaĵojn de tiaj frenezuloj, mi havas bonan ideon pri ĝia enhavo. La problemoj estas, ke MONATO taksas ĝin interesa, provoka ideo, kiu „nek kalumnias nek ofendas iun, krom eble la intelekton”. Ĝuste, la intelekton. MONATO kutime volas informi kaj provoki je inteligenta, intelekta nivelo kaj klopodas malkaŝi la objektivan veron de la situacio, anstataŭ senkritike papagumi la asertojn de iu kaj tiu.

Mi scivolas, ĉu Alexander Gofen estas ŝercema ruzulo, kiu verkis provokan strangajon nur por bati la vespejon. Eble MONATO enkondukis novan rubrikon nomitan „Frenezulgato”. Vi jam raportis pri la raelanoj, kiuj volas konstrui NIFO-ambasadon en Litovio (espereble ne en Vilnius, urbo malpurega pro tiom da cigaredrestajoj).

Scott PAGE  
Usono

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta strataдресo kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net) aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



# Laborista digno

de Stefan MAUL

**A**ntaŭ pluraj jaroj en ĉi tiu revuo mi rezonis pri Usono, kie tiam pli kaj pli multaj homoj ne plu povis vivteni sin kaj siajn familiojn per unu posteno, sed devis akcepti plurajn laborojn, ĉar en la ĉefa posteno ili ne akiris sufiĉe da salajro. Mi esprimis la timon, ke tia evoluo post iom da tempo okazos ankaŭ en aliaj industriaj landoj. Bedaŭrinde tiu timo montriĝis reala, kiel montras freŝaj ciferoj en Germanio. Probable ili validas simile, almenaŭ tendence, por multaj aliaj landoj industriaj.

Laŭ la federacia statistika buroo, en Germanio pli kaj pli malmultaj homoj havas normalan laborpostenon. Konsiderinde kreskis kaj kreskas la nombro de tiuj, kiuj ne plu laboras plentempe sed nur partatempe, en tiel nomataj 400-eŭro-postenoj, kiel „pruntolaboristoj“ aŭ kun kontraktoj, kiuj validas nur por limigita tempo. Laŭ la ciferoj malkreskis la procento de normalaj okupatoj dum la pasintaj dek jaroj de 72,6 % al nun nur 66 %. Inverse, la nombro de netipaj dungatoj kreskis je 2,5 milionoj al 7,7 milionoj. En la jaro 2006 plentempa posteno garantiis meze malnetan salajron de 18 eŭroj/hore, sed la netipaj dungatoj akiris nur 12 eŭrojn/hore. Preskaŭ la duono de homoj sen plentempa okupo tial restas sub la minimuma salajro de 9,85 eŭroj/hore.

## Risko malriĉiĝi

Normala posteno laŭ la kriterioj en Germanio estas dungiteco plene sociale asekurita, kun minimume duono de la kutima plena semajna labortempo kaj kun nelimigita kontrakto en unu entrepreno. Ĉe netipaj okupoj minimume unu el tiuj kriterioj ne ekzistas. Ĉiu kvara nesufiĉe okupata laboristo en Germanio troviĝas sub la minaco de malriĉiĝo.

Tamen la diversaj formoj de netipaj okupoj alportas ne nur malbonon sed ankaŭ ŝancojn. Dum la pasintaj jaroj



multaj homoj antaŭe senlaboraj helpo de tiuj (ŝtate subtenataj) instrumentoj de la labormarketo trovis novajn laborlokojn. Sekve Germanio spite al la ekonomia krizo havas konsiderinde malpli multajn senlaborulojn ol meze de tiu ĉi jardeko. Limigita dungado kaj portempa laboro same kiel pruntolaboro alportas por labordonantoj eblecon reagi al ŝanĝoj de merkato, al laboristoj la perspektivon de posta firma dungiteco.

## Celo maltrafata

Sed inverse, pruntolaboristoj ofte ne sukcesas reakiri normalan postenon. Se homoj dum multaj jaroj devas elteni en tiaj netipaj laborkondiĉoj, la novaj formoj maltrafas la celon. Ili iĝas normalaj – kaj tio ne estas normala. Multaj laboristoj pagas altan prezon por tio. Ili rezignas je pli altaj salajroj, je profesia kariero kaj stabileco. Alarmas, ke homoj kun netipaj laboroj aparte riskas malriĉiĝi. Laŭ la statistiko ĉiu dua akiras malpli ol 9,85 eŭroj/hore. En neniuj kompareblaj landoj la sektoro de subnivela salajro kreskis tiom rapide kiom en Germanio.

Alarme estas ankaŭ, ke pli kaj pli multaj homoj kun bona profesia ins-

truiteco estas inter la laborantoj kun malaltaj salajroj. Tio signifas, ke bona kvalifiko ne garantias bonan enspezon. Pli kaj plu multaj homoj tial rezignacias kaj spertas, ke ne valoras investi multan tempon kaj energion en studado. Junajn homojn do nenio instigas kvalifikiĝi. Probable post kelka tempo mankos faklaborantoj en multaj branĉoj de la labormarketo.

## Valoroj perdiĝas

En mia generacio la situacio estis tute alia. Mian unuan postenon – kun universitata diplomo – mi ekhavis kun 25 jaroj. Entute dum mia laborperiodo mi havis postenojn en kvar diversaj entreprenoj kaj nur unu fojon oni maldungis min (tamen mi tuj trovis novan postenon). La aliajn fojojn mi mem nuligis la kontrakton por transiri al alia posteno. Kaj en ĉiuj entreprenoj oni plene respektis mian homan dignon kiel dungiton, bone pagis kaj prizorgis min. Pri tia homa digno tre multaj junaj homoj nuntempe povas nur revi. En epoko, kiam valoras nur kapitalisma profito de malmultaj, perdiĝas multaj valoroj de humana socio. Kaj la politiko ŝajne ne scias aŭ kapablas, ripari tiun difekton de homa kunvivado. ■

# Forigo-festo

MIKEL ORTEGA



BERNHARD J. HOLZER ©HOP-MEDIA, AUSSENMINISTERIUM

Alois Mock kaj Gyula Horn (de maldekstre) tratanĉas pikdraton ĉe la limtrapasejo Klingenbach (Aŭstrio)/Sopron (Hungario) la 27an de junio 1989.



JAN T. SOTT ©HOP-MEDIA, AUSSENMINISTERIUM

La aŭstra ministro pri eksteraj aferoj Michael Spindelegger, prezidantoj László Solyom kaj Heinz Fischer, hungara ŝtatsekretario Vilmos Szabo (de maldekstre) ĉe la limo.

Ĉe Sankt Margarethen apud la aŭstra-hungara landlimo okazis solenaĵo por festi la forigon antaŭ 20 jaroj de la fera kurteno. Tiam komenciĝis ĉi tie nova, libera erao por Hungario, Aŭstrio kaj tuta Eŭropo, kiam la 27an de junio 1987 la tiamaj ministroj pri eksterlandaj aferoj, Gyula Horn kaj Alois Mock, kune tratanĉis la pikdraton inter siaj landoj.

La ĉi-jaran eventon, okazintan sub la devizo „Eŭropo 1989-2009 dividita – unuigita”, partoprenis la prezidantoj de la du landoj: Heinz Fischer (Aŭstrio) kaj László Solyom (Hungario).

La simbola ago de antaŭ 20 jaroj ekrulis lavangon da aliaj eventoj. Laŭ Michael Spindelegger, nuna ministro pri eksterlandaj aferoj de Aŭstrio: „La paca turno de 1989 estas granda triumfo por la civitanoj de orienteŭropaj landoj. Hodiaŭ apartenas al la pasinteco la gardoturoj kaj pikdrato ĉe la limo. La pacprojekto Eŭropo sukcesis.”

## Fuĝi

La 19an de aŭgusto 1989 okaze de pikniko de Tuteŭropa Unio oni simbole malfermis la limon dum kelkaj horoj. Tiun eblon por fuĝi uzis 600 000 ŝtatanoj de la iama Germana Demokratia Respubliko (GDR), kiuj tiutempe feris en Hungario. Omaĝe al tiu evento nun ĉi-loke estas memorparko.

La politikistoj paŝis simbole tra la „Pordego de libero”, kiu rememorigas pri la amasa fuĝo de orientgermanoj. Eskorto de 70 GDR-aŭtoj „Trabanto”, parte en helaj koloroj, veturis brue hupante el Hungario trans la limo. Inter ili troviĝis ankaŭ aŭtoj, kiujn forlasis fuĝintaj GDR-ŝtatanoj.

**Evgeni GEORGIEV**



# Kiam Is-lando fariĝas os-lando

**L**a islanda parlamento akceptis per minimuma plimulto la kandidatiĝon de Islando por aniĝi al Eŭropa Unio (EU). Tiu ĉi novaĵo apenaŭ ricevis atenton en belgaj komunikiloj. Ili nur menciis la fakton sen komentoj. Tamen belgaj EU-parlamentanoj pozitive reagis al tiu ĉi decido, same kiel José Manuel Barroso, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono.

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj Islando estis konata en Belgio nur pro raportoj de ravitaj turistoj, kiuj pagis relative altajn prezojn por viziti tiun ĉi landon, kaj poste eŭforie rakontis pri unikaj spertoj.

## Renoma revuo

Tamen en periodo, kiam la rento por ŝpardeponoj en Belgio apenaŭ sufiĉis por kovri la inflacion, islandaj bankoj reklamis nekutimajn interezojn. Kiam la renoma revuo *Test-Aankoop* (Aĉet-testoj) indikis la islandan Kaupthing-bankon kiel la plej favoran, kaj kiam la prestiĝa financa revuo *Trends* (Tendencoj) pozitive konsilis, la belga filio de la islanda banko rapide atingis 20 000 klientojn, kiuj senzorge konfidis al ĝi sian tutan ŝparmonon.

Kiam en 2008 kelkaj usonaj bankoj ekhavis problemojn, ili kuntiris ankaŭ la islandajn. La ŝparkontoj de la Kaupthing-filioj en Belgio kaj Luksemburgo blokiĝis. Belgaj klientoj ege protestis ĉe la registaro, ĉar tiu garantiis la ŝpardeponojn de klientoj de belgaj bankoj en problemoj, sed ne tiujn de Kaupthing-Belgio. Finfine belga koooperativa banko *Landbouwkrediet* (Kreditbanko por Terkulturistoj) transprenis ĉiujn klientojn. Tiuj tamen devis atendi ĝis julio 2009, antaŭ ol ili povis denove disponi pri sia mono.

## Komerca traktato

Dum multaj jaroj la bonfarta Islando preferis resti sendependa. Ĝi tamen havis komercan traktaton kun Eŭropa Unio. La prospero de Islando baziĝis

grandparte sur bankaj aferoj, tiel ke la financa sektoro reprezentis 34 % de la ekonomio. Rezulte de la financa krizo la tri ĉefaj bankoj estas transprenitaj de la ŝtato.

Finfine la ŝuldoj de Islando iĝis kvin- ĝis naŭ-oblo de la malneta enlanda produkto. Multaj islandanoj perdis siajn ŝparmonon kaj oficon. Eŭropa Unio povus subteni la landon por superi la krizon. Tial la sinteno en Islando renversiĝis. En 2009 formiĝis minoritata registaro kun Alianco, la sola partio, kiu subtenis la aliĝon al EU, kaj Verda Maldekstro, sub ĉefministriro Sigurðardóttir. Kaj nun la parlamento finfine voĉdonis aliĝi.

## Kandidatoj

Malgraŭ la financaj problemoj, belga EU-parlamentano opinias, ke la membriĝo povos efektiviĝi en minimuma tempo. Multegaj reguloj plenumendas de kandidatoj por aliĝi al EU. Tamen i.a. pro la komerca traktato kaj pro multaj rilatoj kun aliaj eŭropaj ŝtatoj, plenumi tiujn regulojn apenaŭ estos problemo por Islando.

Aliĝo de tiu ĉi ankoraŭ nun bonfarta lando kun nur 320 000 loĝantoj ne povos tuŝi la ekonomian situacion de la Unio. Supozeble do Islando aliĝos en 2011. Tio povus okazi samtempe kun la aliĝo de Kroatio, se Slovenio ne vetos pro limdisputoj. La du novaj landoj iĝus la 28a kaj 29a membroj de la Unio.

Ivo DURWAELE



ANDREAS TILLE



ANDREAS TILLE

# Kverelas la komunumoj



**B**elgio estas stranga malgranda ŝtato kun ses parlamentoj: federacia (kun du ĉambroj: ĉambro de deputitoj kaj senato), flandra regiono, valona regiono, ĉefurba regiono, franclingva komunumo (respondeca pri lingvaj kaj kulturaj temoj en Valonio kaj Bruselo) kaj germanlingva komunumo (respondeca pri proksimume 74 000 germanlingvanoj).

Komence de junio la belgoj devige voĉdonis por ĉiuj parlamentoj escepte de la federacia. Intertempe rapide kunmetiĝis kvin registaroj, kaj ŝajne en granda harmonio. La diversaj intencdeklaroj havis kelkajn komunajn trajtojn. Evidente ĉiuj volas realigi ŝparojn. La registaroj mem volas montri ekzemplon, limigante la nombron de ministroj kaj malgrandigante iliajn stabanojn.

Plue Flandrio intencas ŝpari du miliardojn da eŭroj kaj atingi buĝetan ekvilibron en 2011, dum Valonio esperas atingi ekvilibron nur en 2015 aŭ 2016. Sed la regionoj ankaŭ volas investi por

revivigi la ekonomion. Valonio lanĉis duan „Marshall”-planon (George Marshall [ĝorĝ marŝal], usonano, helpis revivigi la eŭropan ekonomion post la dua mondomilito) kaj planas helpojn de 1,6 miliardoj da eŭroj. La brusela regiono baraktas en malfacila financa situacio kaj atendas helpojn de la federacia registaro. Sed la financoj de la federacio montriĝas neelteneblaj.

## Impostoj

La konkordo en la diversaj parlamentoj kontrastas al la tensioj, kiuj akriĝas en la federacia parlamento, aparte inter valonoj kaj flandroj. Temas pri financoj: la federacia registaro enkasigas impostojn kaj dividas la monon grandparte inter la regionoj.

La enspezoj el Flandrio estas konsiderinde pli grandaj kaj vastaj sumoj do fluas al Valonio kaj Bruselo. Valonio ŝajnas pli sociema, kiam temas ekzemple pri azilpetantoj kaj senlaboruloj, kiuj bezonas pli da mono por instruado

kaj sociaj servoj. Tamen Flandrio estas pli riĉa regiono (unu el la plej riĉaj en Eŭropo) kaj ŝajne pli efike funkcias. Flandraj politikistoj opinias, ke la valonaj elspezoj eblas nur pro la pli strikta financa politiko en Flandrio.

Flandraj industriistoj opinias, ke la ekonomio, ĝuste pro tiuj forfluo de mono, perdas dinamikecon. Jam de kvin jaroj la flandroj postulas ŝtatan transformiĝon, por ke ĉiu regiono havu pli da respondeco ankaŭ pri enspezoj, sed la franclingvanoj ne emas partopreni la debaton. En 2007 komenciĝis tiurilate traktadoj, sed la ĉefa sekvo estas nur paralizita federacia registaro.

## Maddens-doktrino

Nun la starpunkto de la flandra registaro ŝanĝiĝis. Ĝi decidis apliki la tiel nomatan Maddens-doktrinon. La flandra politikologo Bart Maddens proponis, ke oni ne plu postulu ŝtatreformon, sed eluzu leĝajn kaj konstituciajn eblojn por organizi Flandrion laŭ propra volo kaj firme interrilatu kun la federacio.

Cetere evidentas, ke la mono, pri kiu disponas la federacia registaro, ne plu sufiĉas por plenumi ĝiajn respondecojn. Kaj la brusela regiono kaj Valonio bezonas plian financon helpojn. Cetere alarmige estas por Valonio, ke la flandra ministro respondeca pri la buĝeto, Philippe Muyters, apartenas al la dekstra partio N-VA, kiu celas apartan flandran ŝtaton. Antaŭvideblas do en Belgio streĉa periodo.

Kontraste al la nocio de multaj eksterlandanoj, la plimulto de la belgoj – ankaŭ en Flandrio – ne deziras la disfalon de sia lando, kvankam en Flandrio konsiderinde kreskas la nombro de tiuj, kiuj konsentus dividi la landon, se fine ne povos interkonsenti la regionoj.

Ivo DURWAELE



FRANÇOIS DELBAR



# Mortigoj religiaj

**D**enove en norda Niĝerio mortigis islamaj militistoj aŭ jihadistoj pli ol 1000 homojn. La mortigoj, en la ŝtatoj Kano, Bauchi, Borno kaj aliaj, sekvas similajn atakojn antaŭ unu jaro en la ŝtato Plateau.

Niĝerio daŭre suferas en la nordo pro religia krizo inter kristanoj kaj islamanoj. La niĝeria konstitucio estas sekulara kaj rekonas la kuneziston de kristanoj kaj islamanoj. Malgraŭ tio miloj da homoj en la lastaj dek jaroj estas mortigitaj en la ĉefe islama norda parto de Niĝerio, kie oni sekvas preskaŭ centelcente ŝarion, la islaman leĝaron. La suda parto estas ĉefe kristana.

## Preĝejoj

En la nuna krizo islamaj jihadistoj atakis preĝejojn, policejojn kaj hejmojn de kristanoj. Akriĝis la atakoj aparte en ŝtato Borno, kiu dividas landlimon kun Ĉado. Prezidanto Umaru Musa Yar'Adua surstratigis policanojn kaj soldatojn en pluraj nordaj ŝtatoj. Li ordonis, ke soldatoj kaptu kaj se eble mortigu jihadistojn.

Problemoj okazas, kiam politikistoj ekspluatas etnajn diferencojn por semi malamon kaj malamikecon inter la pli ol 450 etnaj grupoj en Niĝerio. Ne antaŭvideblas fino de la konfliktoj en regiono, kie koruptaj politikistoj misuzas sian povon por regi civitanojn – ne malofte fanatikulojn religiajn, kiuj restas needukitaj kaj malavantaĝigitaj.

Princo Henriko OGUINYE/pg



RADIO NEDERLAND WERELDOORLOEP

# Obama: For la fortuloj!

**E**n julio la usona prezidanto Barack Obama vizitis la okcident-afrikan ŝtaton Ganao. La evento estis vere historia: jen la unua fojo, ke Obama vizitis la regionon (krom antaŭ nelonge Egiptio). Bonvenigis la prezidanton ganaanoj, kien ajn li iris, dum la unutaga vizito.

Ne hazarde la prezidanto elektis Ganaon. Komentistoj en Afriko opiniis, ke la vizito sendas gravan mesaĝon al afrikaj gvidantoj, nome, ke la usona registaro kaj fakte la mondo alte taksas demokration kaj foreston de korupto. Ganao en la lastaj jaroj voĉdonis laŭ demokratiaj principoj kaj elektis gvidan-



tojn spegulantajn la volon de la popolo. Tio ne okazas en aliaj afrikaj landoj kiel ekzemple Niĝerio, Kenjo aŭ Zimbabvo.

Obama prelegis al la ganaa parlamento, dirante, ke Afriko bezonas ne tiranecon aŭ fortulojn, sed justecon kaj obeon al la leĝaro. Cetere Afriko kreu fortajn demokratiajn instituciojn, inklu-

zive de libera esprimado, sendependaj justicoj, honestaj policoj kaj fortaj parlamentoj.

Post la ĉefurbo la prezidanto vizitis kastelon en la apuda urbo Cape Coast, de kie en antaŭaj jarcentoj oni eksportis sklavojn al Eŭropo kaj Ameriko.

Princo Henriko OGUINYE/pg



## BALKANIO

# Vizoj reviziitaj

**L**a Eŭropa Komisiono anoncis lastatempe, ke Makedonio, Serbio kaj Montenegro jam plenumas la kondiĉojn por ebligi ekde 2010 liberan moviĝon de iliaj civitanoj tra Eŭropa Unio (EU), dum Albanio kaj Bosnio ankoraŭ ne. Oni eĉ ne menciis la plej novan balkanan ŝtaton, Kosovo.

Tial aŭdiĝis voĉoj, ke „la kristana Eŭropo akceptas nur kristanajn landojn”. Ĉu jes aŭ ne, Albanio, laŭ ties ĉefministro Sali Beriša, solvu siajn „hejmtaskojn”: tio estas pli rigore kontroli la landlimon, batali kontraŭ korupto kaj havigi al la civitanoj novajn biometrikajn identec-kartojn kaj pasportojn.

Civitanoj de la landoj de okcidenta Balkanio delonge suferas pro la malfacilo libere moviĝi tra EU, kie vivas kaj laboras centmiloj da iliaj sampatrujanoj kaj samfamilianoj. Cetere, EU-konsulejoj postulas multajn dokumentojn kaj monon, kio, okaze de neakireblo de vizo, ne redoneblas.

## Diskriminacio

Pro tiaspeca diskriminacio eĉ pli suferas Kosovo, kiu ekde 1999 fariĝis iasence geto. La direktorino de la Kosova Iniciato por Stabiligo diris, ke „kosovanoj malfacile moviĝas eĉ ene de la regiono.” Tamen la ĉefa ambasadorino en Priština argumentis, ke „Kosovo estos parto de la procezo kaj EU faros sian plejblon por helpi ĝin.”

Anoncante la liberan moviĝon de civitanoj, la komisiono tamen avertis Serbion, ke ĝi ne liveru pasportojn al albanoj de Kosovo. Tio montras alian diskriminacion rilate albanojn, dum serboj de Kosovo havas duŝtatanecan kaj povos moviĝi senprobleme.

Sendube la situacio komplikiĝas, ĉar kvin EU-membroj (Slovakio, Rumanio, Hispanio, Grekio kaj Kipro) ankoraŭ ne agnoskis la sendependecon de la nova ŝtato Kosovo. Tamen Eŭropo ne povas havi du kriteriojn rilate vizojn por la lastaj landoj de la malnova kontinento.

Bardhyl SELIMI

## KOSOVO

# Ĉu Interpol-uo?

**F**ine de junio la bulgara sekcio de la internacia polica organizaĵo *Interpol* arestis ĉe la landlimo inter Makedonio kaj Bulgario la eksan ĉefministron de Kosovo, generalon Agim Ĉeku. Jam du aliajn fojojn li estis arestita en Budapeŝto kaj Slovenio. Same la polico de Kolombio antaŭ du monatoj elpelis lin el la lando.

La eksa politikisto estas tiel traktata, ĉar ekzistas kontraŭ li (same kontraŭ aliaj albanaj eminentuloj aktivaj dum la nacilibera milito) juĝa ordono fare de

Serbio. Bulgario mem jam agnoskis Kosovon kiel sendependan ŝtaton, kaj pro tio la neamika konduto mirigis multajn.

Civitanoj de la nova respubliko de Kosovo estas seniluziigitaj pro serba fiinfluo kaj ankaŭ pro la reago de ja prestiĝa internacia polica institucio kiel *Interpol*. Samtempe ili scias, ke oni ne agas sammaniere kontraŭ Ratko Mladić, tutmonde rekonata kiel vera militkrimulo, kiu libere moviĝas eĉ ekster sia propra lando.

Bardhyl SELIMI

## ALBANIO

# Rezulto proporcia



**L**a 28an de junio okazis ĝeneralaj balotoj en Albanio. Uzita estas nova elekto-kodo, proporcia-regiona anstataŭ majoritata, aprobita en februaro. La iama majoritata sistemo celis malpliigi parlamentajn partiojn, sed provokis fortajn protestojn. Koleris aparte la Socialista Movado por Integriĝo, estrata de Ilir Meta, kiu disiĝis antaŭ kvin jaroj de la Socialista Partio de Edi Rama, urbestro de Tirano.

Kiel atendite, la rezulto estis komplika. La dekstra demokrata koalicio akiris 70 el 140 deputitaj mandatoj, do egale al la koalicio maldekstra. Tial la Socialista Movado por Integriĝo, kun kvar mandatoj, akceptis la proponon de Sali Berisha, la aktuala demokrata ĉefministro, por kune fondi novan registaron.

## Krizo

Tiel solviĝis la politika krizo kaj la nova registaro, aprobita de nova parlamento frue en septembro, unufoje enhavos dekstrulojn kaj maldekstrulojn. Tio servus finfine al plua integriĝo de la lando kun Eŭropo.

La elekto-kampanjo estis la plej multekosta. Ambaŭ ĉefaj partioj, la demokrata kaj la socialista, kontraktis por la kampanjo kun usonaj reklam-kompanioj.

Bardhyl SELIMI

JAPANIO

# Invititoj profesiaj

**A**l japanaj geedziĝaj festoj oni kutime invitas ĉirkaŭ 100 homojn, 50 el edza flanko, 50 el edzina. La gastoj inkluzivas parencojn, amikojn kaj kolegojn. Kiel ĉefgastojn oni invitas superulojn el siaj laborejoj.

Tamen ofte malfacilas ekvilibrigi la nombrojn de ambaŭflankaj invititoj. Ĉefgastoj el ambaŭ flankoj nepre salutas en la festo, sed, se mankas homo el la edza flanko, tio estas mizera afero. Cetere povas esti, ke edzo aŭ edzino partatempe laboras kaj ne havas intimajn kolegojn por inviti, aŭ la invititoj estas subite maldungitaj. En tia okazo oni povas peti helpon de kompanio, kiu sendos anstataŭantojn.

Kompanio tia estas *Officeagent*, fondita en 2001. Lastan jaron venis 100 petoj, duoble pli ol en 2006. La tarifo estas 20 000 enoj (ĉ. 150 eŭroj) krom veturkostoj por ĉiu anstataŭanto. Laŭ la fondinto de la kompanio, s-ro Takemoto: „Luj petas helpon, pretekstante, ke la invititoj ne povos veni pro neatendita problemo, sed fakte ili ne havas intimajn kolegojn kaj amikojn. Homaj rilatoj pli kaj pli maldensiĝas pro la malapero de dumviva dungado.”

## Banala saluto

Raportis la ĵurnalo *Asahi* pri vira „anstataŭanto”, 37-jara, kiu jam pli ol 20 fojojn ludis sian rolon en geedziĝaj festoj kiel kolego aŭ amiko de la edzo. Li faras mallongan, banalan saluton kaj eĉ petite kantas. Sed nepras, ke li estu atenta por kaŝi sian anstataŭantecon.

Antaŭ la festo, li lernas pri la kompanio de la edzo kaj memoras nomojn de tieaj gravuloj, sed, por eviti konversacion pri detalaj aferoj, kelkfoje fuĝas eksteren por fumi. Post la festo fojfoje venas dankesprimoj de la geedzoj pri lia lerta ĉeesto. Li tre ĝuas sian laboron, manĝante

bongustaĵojn, ricevante festan donacon kaj kontribuante al sukcesa festo.

## Malagrabra sento

Ĝis la 1990aj jaroj, japanoj laboris en unu kompanio ĝenerale ĝis emeritiĝo. Do neniam mankis invititoj – eĉ male, sed kiun elekti malfacilis kaj povis doni malagrablan senton al ne-invitoj. En provincaj kaj kamparaj urboj geedziĝaj festoj estas grandaj kun pli ol 200 invititoj. Tamen la festoj pli kaj pli malgrandiĝis, tiel ke nun furoras mal-

grandaj eventoj, nur kun familianoj, aŭ foje eĉ neniuj festoj.

Invititoj devas donaci monon al la geedzoj. Virinoj devas vesti sin per kimono kaj por tio ili devas viziti beligitinon, pagante multe. Ofte ili iras al la festo ne volonte sed duondevige. En la nuna malvarma socio kaj malprospira ekonomio estas pli bone solvi la problemon per mono, invitante profesiajn „gastojn”, kiuj ĝoje ĉeestas kaj gajigas la etoson.

HORI Jasuo





LITOVIO

# Sonas la jarmilo



*Inaŭgurita estis skulptaĵo La arbo de unueco por celebri la miljaron. Antaŭ ĝi staras maldekstre la litova prezidento Valdas Adamkus kun, dekstre, la ĉefministro Andrius Kubilius kaj kreintoj de la monumento.*



En la jaro 1009 unuafoje estis menciita en priskribo pri pereinta misiisto la nomo „Litovio”. La originala dokumento estis verkita en la nord-germana urbo Quedlinburg. El Germanio oni sendis al Litovio kopion de la pergameno de la 11a jarcento, por helpi al la lando celebri en julio sian jarmilon.



**K**omenciĝis la celebrado per kantado de la nacia himno ĉe la katedrala placo en la ĉefurbo Vilnius. Sekvis ses tagoj da koncertoj spegulantaj diversajn stilojn: folkloran, dancan, orkestran, korusan. En ĉi lasta kunkantis 10 000 litovoj el la tuta lando.

Dum la lasta kantofesto estis inaŭgurita skulptaĵo *La arbo de unueco*, kiu eternigos la jarmilon de la nomado de Litovio kaj samtempe 100 plej eminentajn litovojn. Cetere okazis koncerto en la havenurbo Klaipėda, kien revenis la velŝipo *Ambersail* post naŭmonata, ĉiukontinenta vojaĝo por reklami ĉe eksterlandaj litovoj la jarmilon.

*Ne okazas nacia festo sen popoldancado.*





*Dum ses tagoj litovoj kunfestis,  
prezentante scenojn el la longa, miljara historio.*

## Nacia himno

La landa prezidanto, Valdas Adamkus, invitis litovojn en la tuta mondo je difinita horo kunkanti la nacian himnon. En ĉiuj urboj kaj urbetoj de Litovio amase kuniĝis homoj por la komuna kantado. Samtempe sonis la himno en komercaj centroj, kafejoj kaj restoracioj, ankaŭ en 40 aliaj landoj, kie loĝas litovoj.

Tamen ne nur muzike kaj kante oni festis. El ĉiuj partoj de Litovio oni kunportis terpecojn por krei mapon de la lando, kaj membroj de aŭtomobila klubo vizitis per siaj antikvaj veturiloj historiajn lokojn en Litovio.

Por kuncelebri venis prezidantoj de Latvio, Pollando, Finnlando, Ukrainio, Islando kaj Kartvelio kun diversaj ministroj. Venis ankaŭ reĝoj kaj reĝinoj el Norvegio, Svedio kaj Danio. Ili ĉeestis meson en la katedralo kaj simbole inaŭguris rekonstruitan reĝan palacon (pro la ekonomia krizo ankoraŭ ne tute pretan).

LAST



*Antikvaj aŭtoj rondiris la landon, vizitante historiajn lokojn.*



*Bele vestitaj knabinoj helpis krei festan etoson.*



## PRIZONOJ

# Pri lokoj kaj moko

**D**um jaroj en Belgio mankas karcerlokoj. Gardistoj plendegas pri streĉaj situacioj pro troloĝateco. Policistoj perdas motiviĝon, ĉar aro da krimuloj, kaptitaj en freŝa faro, tamen restas liberaj pro manko de lokoj. Diversaj ministroj pri justico faris promesojn, ekzamenis kaj daŭre ekzamenas eblajn solvojn, sed la situacio apenaŭ pliboniĝis.

Sed enkarcerigitoj mem zorgas pri solvo. En julio tri krimuloj eskapis el prizono en Bruĝo per kaperita helikoptero. Kelkajn tagojn poste tri aliaj uzis eskalon, kiun laboristoj postlasis, por transrampi muron kaj fuĝi per la aŭto de la patrino de unu kaptito, kiu atendis antaŭ la enirejo (elirejo?).

Denove, komence de aŭgusto, du gangsteroj forkuris, ĉi-foje el la juĝejo en Bruselo, post kiam tien eniris kaj minacis armitaj kaj maskitaj helpantoj. Tri eskapoj de ok personoj en nur du semajnoj. Ĝis la mezo de aŭgusto en la nuna jaro jam eskapis 39 kaptitoj.

## Nepardoneblaj eraroj

Evidente la ministro pri justico, Stefaan De Clerck [stefán deklérk] dronas sub kritikoj de komunikiloj kaj de opoziciaj politikaj partioj. Oni efektive faris nepardoneblajn erarojn. Jam en 2007 okazis du fuĝoj per helikoptero. La parlamento tiam voĉdonis por sekurigi la ĉefajn prizonojn por malebligi tion kaj antaŭvidis buĝeton. Sed, en 2009, unu el la plej danĝeroj banditoj en Belgio troviĝis en malliberejo, kie mankis ĝuste la promesita sekureco.

La krimuloj, kiujn oni volis prijuĝi en la brusela justicpalaco, jam faris plurajn perfortaĵojn kaj aperis antaŭ juĝisto pro provo prirabi, kun minacado al etulo kaj pafado al policistoj. Sed la servo,

kiu zorgis pri ilia tiea alveno, taksis ilian ĉeeston en la juĝejo senriska, kaj do ĉeestis nur nearmitaj gardistoj.

## Primokaj artikoloj

Ne nur eskapoj estigas primokajn artikolojn en la gazetoj. La kompatinda ministro pri justico devas digesti mon-ton da plendoj kaj primokoj, sed lia povo estas tre limigita pro aŭtonomio de la justico.

Ĉu la eskapoj efektive kontribuas al la solvo de la lokmankoj? Fakte la granda plimulto de la eskapintoj poste rekaptiĝas. Sed estus pli efike, se la belgaj polico kaj justico penadus gardi danĝerajn banditojn kaj solvi la lokmankon anstataŭ mobilizi armeon por retrovi eskapintojn. Aliflanke oni ne tro plendu. Antaŭ jaroj iam eskapis pli ol 250 homoj en unu jaro.

Ivo DURWAELE



## Donackupono

**Donaco por via korespondamiko?**

**Donaco por la amikoj de Pasporta Servo**  
kiuj tiel afable gastigis vin?

**Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?**

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

**Ekzistas tri versioj:**

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe  
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,  
Belgio aŭ rete ĉe **monato@fel.esperanto.be**.



# Kiam akvo trovis la „ŝipon”

*La konstruaĵo Albertina situas sur iama bastiono.*

**E**n la muzeo *Albertina* en Vieno troviĝas 41 000 desegnaĵoj kaj 900 000 grafikaĵoj. Ĝin fondis en 1776 la princo Albert Kasimir von Sachsen-Teschen. Ekde 1822 la kolekto estas publike vizitebla. Hodiaŭ ĝin posedas la ŝtato.

La konstruaĵo staras sur iama bastiono de la viena urbomuro proksime al la ŝtata operejo. Dum renovigo inter 1996 kaj 2003, kiam la kolekto estas fermita, estis konstruita subtera deponejo 3000 kubikmetrojn granda. Krome oni konstruis en la suba etaĝo rondajn fenestrojn por sugesti – laŭ la arkitektoj – ŝipon.

## Humideco

Tamen post pluvego en junio 2009 enfluis kelkcent litroj da akvo en la novan deponejon. Bonŝance nenijaj artaĵoj estas difektitaj. Tamen pro tro alta aera humideco oni devis fortransporti la valorajn objektojn, kiuj troviĝas en diversgrandaj skatoloj. Dum ses semajnoj 80 helpantoj laboris po 100 horojn semajne.

Nerespondita estas la demando, kiu pagos la kostojn – ĝis nun milionon da eŭroj. Eble kaŭzis la problemon fuŝita laboro dum la rekonstruado. Informoj pri *Albertina* legeblas ĉe: [eo.wikipedia.org/wiki/Muzeo\\_Albertina](http://eo.wikipedia.org/wiki/Muzeo_Albertina).

Walter KLAG



*En Albertina troviĝas renomaj bildoj, inkluzive de la „Kampa leporo” (1502) de Albrecht Dürer.*

GERMANIO

# Sango kaj honoro

**La artikolo klarigas, kial Monato rajtas, ja nevole, sed sentime aperi nazian sloganon.**

**P**aragrafo 86a de la germana krim-jura kodekso malpermesas, minacante per puno, publikan uzon de faŝistaj simboloj, paroloj, motoj ktp, devenantaj el la tempo de la „tria regno“. Ĝi validas ankaŭ por aktualaj faŝismaj simboloj, do por tiaj, kiuj „similas konfuzeble“ al la naziaj.

Laŭ la leĝo, akirigita en 2005: „Tri jarojn da karcero aŭ monpunon ricevas tiu, kiu publike aŭ en kunveno lezas la publikan pacon per konsento al, glorado de kaj justigo de la nacisocialista regado.“

Klara decido, sed sekvoj en la praktiko montriĝas komplikaj. Jam plumpaj imitoj ne estas facile trakteblaj de la juĝistoj kaj, inverse, kontraŭfaŝista bonintence trastrokita svastiko antaŭ du jaroj apenaŭ povis eskapi punan verdikton.

## Delikata

Aktuala kazo estas aparte delikata. La ekstremdekstra organizaĵo „Blood and Honour“, fondita en la 80aj jaroj en Britio, estas malpermesita depost 2000 en Germanio. Laŭ la ministrejo pri internaj aferoj, ĝi agas kontraŭ la konstitucia ordo kaj internacia kompreniĝo.

La organizaĵo uzas anglalingve la sloganon de la hitlera junularo „Blut und Ehre“, do „Sango kaj honoro“. Sed nun, vendisto de t-ĉemizoj kun la anglalingva slogano, evidente kontraŭleĝa, kontraŭis advokate akuzon antaŭ suba juĝejo – kaj gajnis la proceson ĉe la federacia kortumo en Karlsruhe.

Laŭ la decido de la tieaj juĝistoj, naziaj sloganaj en fremdaj lingvoj ne

rekte peras ties enhavon kaj ne plu estas rekoneblaj kiel identigiloj de kontraŭkonstituciaj organizaĵoj. Sekve, germanlingva uzo de naziaj motoj estas punata, dum celkonscia tradukaĵo en aliaj lingvoj restas nepersekutata.

## Stultaj

Ĉu do *Karlsruhe locuta, causa finita* – Karlsruhe parolis, do finiĝis la afero? Almenaŭ mirigas, ke germanaj juĝistoj en 2009 agnoskas la anglan lingvon, post pli ol 60 jaroj da pena instruado en sia lando, „fremda“. Ĉu ili vere taksas membrojn, klientojn, simpatiantojn, do la „bruneman“ parton de la germana popolo, tiom stultaj, ke ili ne rekonas la tiamajn kaj ankoraŭ aktualajn naziajn kaj naziemajn kaptilojn?

Ne, ili bone konas la trukojn de la ekstremaj destruktoj, ludantaj nun ankaŭ per lingvoj. Sed ili preferas reĵeti la kazon al la politiko, la socio mem. Laŭ ili, la punleĝo sola ne kapablas forigi la nazian idearon el la socio. Certe. Sed en aliaj kazoj tiaj superaj kortumoj ne hezitas memkonscie kaj decideme interveni per verdikto.

**Franz-Georg RÖSSLER**  
Germanio



Mendu ĉe via loka libroservo  
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)  
[retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

## La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis

ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj,

kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.



# Ekzameno ekzamenata

**U**nuecan universitatan enirekzamenon organizas Ĉinio en junio de ĉiu jaro. La ekzameno okazas samtempe en diversaj regionoj de la lando. Por diplomitoj de superaj mezlernejoj, precipe tiuj el malriĉaj familioj, partopreno en la ekzameno estas la sola vojo por forigi malriĉecon. Tial la ekzameno fariĝis tre grava evento pro multaj ligitecoj kun la socio.

En Ningbo, urbo en suda Ĉinio, patrino petis helpon de policano pro trafika obstrukco sur la vojo al la ekzamenejo. La policano aŭte transportis ŝin kaj ŝian filon al la ekzamenejo malgraŭ la ruĝa lumo ĉe vojkruciĝoj. En la urbo Xi'an pli ol 50 gepatroj de ekzamenatoj baris per rubandoj straton je 500 metroj fore de la lernejo, en kiu iliaj gefiloj partoprenis la ekzamenon, timante bruon ĝeni la ekzamenatojn.

## Polico

En ordinaraĵoj tiaj agoj estas kontraŭleĝaj, tamen la publiko montris grandan indulgemon al similaj eksterordinaraĵoj en momento tre grava por la

*Multaj profitas, vendante librojn por helpi lernantojn sukcese trapasi la enirekzamenon.*



lernantoj. En iuj lokoj la polico eĉ helpis gepatrojn bloki vojojn ĉirkaŭ la ekzamenejo. Iuj magistratoj dekretis limigon al la bruado de veturiloj por krei kvietan etoson en la ekzamena periodo.

Kontraste al la maltrankvilo de gepatroj, komercistoj bone utiligas la okazon. Aprile ili ofertas diversajn demandarojn, gvidlibrojn kaj prelegojn de prestiĝaj instruistoj pri la ekzameno. Libroj pri la angla lingvo havas plej grandan debiton: multaj ĉinoj pensas, ke estas facile trovi laboron post universitata studado, se ili povas flue paroli la anglan.

## Nutraĵoj

Maje abundas reklamoj pri sanigaj nutraĵoj speciale por antaŭekzamenaj lernantoj. Junie, tuj post la ekzameno, turismaj agentoj proponas al lernantoj kaj gepatroj feriojn. La rezultoj de la ekzameno estas anoncataj fine de julio kaj komence de aŭgusto, kaj do tiam restoracioj kaj distrejoj aparte viglas kaj prosperas pro la malavara konsumo fare de la sukcesintoj. Al festoj tiaj estas invitataj kutime instruistoj, parencoj, amikoj kaj kolegoj.

La ekzameno ankaŭ kuraĝigas profitadon kaj krimojn. En retpaĝaroj fiuloj vendas spionajn aparatojn, kiujn oni vidas nur en la filmo-serio pri James Bond 007. Promesite estas, ke aĉetintoj ricevos per la aparatoj helpon dum la ekzameno. Tiu ĉi friponaĵo estas efektivigita de komplikaro: kelkaj enmiksiĝas kiel lernantoj en la ekzamenejon kaj telesendas demandojn al la ceteraj, kaŝitaj en proksima aparta-



*Abundas friponiloj, kiujn studentoj kaŝe kunportas en la ekzamenejojn.*

mento; la lastaj solvas la demandojn kaj sendas la respondojn al la lernantoj.

## Skribiloj

Ĉi-jare en la nord-orienta urbo Songyuan la polico malkovris gravan okazon de friponado. Mezlerneja instruistino kaj ŝia kolego estas arestitaj pro implikiĝo en la friponaĵo. Ili vendis spionajn aparatojn al siaj lernantoj. Ankaŭ lernantoj plene elvolvis siajn talentojn. Iuj eltrovis diversajn rimedojn, ekzemple skribilojn kun kaŝitaj slipetoj aŭ kopioj, por friponi dum la ekzameno.

Rezulto de freŝa enketo montris socian problemon, ke ĉirkaŭ 70 % de urbaj lernantoj iris al la ekzamenejo en la akompano de la gepatroj, kaj 90 % de la lernantoj elektis universitaton tute laŭ la propono de siaj gepatroj. Mankas memstareco al ĉinaj lernantoj, precipe al solinfanoj. Tro dorlotitaj, ili ne kapablas kontraŭi diversajn premojn; enoficiĝinte, ili ne povas starigi bonajn rilatojn kun kolegoj aŭ rapide akomodigi al novaj situacioj.

Alice Liu

# Ĉu necesas psikologa rethelpo esperantlingva?



PSICOLOGOS TOUTIQUE

**K**iu estas mense sana? Antaŭ ne longe, eĉ se oni sciis, ke ekzistas psikologoj, oni ofte kredis, ke ili estas por la aliuloj, tiuj, kiuj „ne fartas bone en sia kapo”. Kaj, eĉ se oni ne fartis tre bone, oni tute ne iris konsulti psikologon: oni estus rigardata kiel frenezulo de tiuj, kiuj aŭdus, ke oni vizitis psikologon.

## Kutimuloj, ne normaluloj

Sed ne ĉiuj opinias tiel. Antaŭ duonjarcento iuj aŭtoroj – ekzemple Michel Foucault – ekmontris, ke la frenezo estas antaŭ ĉio la bildo, kiun iu socio faras por si pri kelkaj inter siaj anoj: kolektiva, historia percepto; oni ne konsideras kiel frenezulojn en ĉiaj landoj kaj en ĉiaj epokoj la samajn personspecojn. Aliaj – ekzemple Hannah Arendt kaj Stanley Milgram – komprenis kaj klopodis por klarigi: kutimuloj, kiuj sentas sin bonfartaj, kaj kiuj ŝajnas al sia ĉirkaŭlaro normalaj, en tiu grupo agas neracie, male al siaj intereso, kaj precipe male al la intereso de aliaj, ĝis genocido kaj medidetruo.

## Tutmondigo, individuigo

Pli freŝdate, de 20–30 jaroj, la mondo kaj samtempe nia bildo de la mondo ekŝanĝiĝis ankoraŭ pli rapide. La energia krizo, la disfalo de la komunista kampo, la triumfo de la novliberala ekonomio, la komputada revolucio, la ekologiaj perturboj, la malsatego trafanta ĉiam pli multajn homojn kaj

la senmezura riĉiĝo de malgrandega mon-oligarkio submetis nin al ĝis nun nekonata streĉiteco inter tera kaj homarana tutmondigo kaj diseriga individuigo de la socio.

## Nova erao, erao „posta”

Se, post la dua mondmilito, la psikologio de la blankuloj povis ankoraŭ kontentiĝi per unu sola kultura traktato – bazita sur la okcidenta kulturo – kaj samtempe rigardi sin kiel universalan psikologion, la nuntempaj malordajoj malstabiligas eĉ la enajn strukturojn de tiu ĉi civilizacio. Pensu pri la evoluo de la homaro kaj de la familio en Eŭropo kaj en norda Ameriko, pri la dungiteco ĉie ĉiam pli malofta, necerta, portempa. Senpera, plane da informado, la migrado de pli kaj pli grandnombraj homamasoj kaj la multiĝantaj translokiĝoj de entreprenoj trudas aliajn normojn kaj novajn kaj fortegajn.

## Kaj la esperantista popolo?

La esperantistoj formas en la nuna homaro speciale interesan grupon. Ilia ĉeesto en la plimultaj landoj, ilia diversega sperto povus instigi klerigajn interŝanĝojn por ili kaj iliaj samideanoj, kaj ankaŭ por la interkultura psikologio.

## Al kio servas la psikologio?

Psikologio estas la studado de la mensaj faktoj kaj procezoj, kiuj produktiĝas en rilata kunteksto. La unua celo ekkontakti psikologon – tiel, kiel okazas ĉiam pli ofte per rethelpo – estas la solvo de konkretaj problemoj. Sed, el psikologia vidpunkto, la starigataj problemoj ne tuŝas nur la personon, kiu metis ilin, sed ankaŭ la medion de tiu persono, en plej vasta kaj malvasta senco. Gravas do konsi-

deri ĉiujn determinantojn, kiujn atingas tiu, kiu metas la problemojn, kaj la psikologon, kiu provas faciligi ties solvon. Tiel, oni povas ekzameni ĉiun psikologian problemon almenaŭ laŭ vidpunkto persona kaj socia. Krome, la traktinda problemoj estas samtempe „klinika” demando (kiel konsultanto ekvilibrigas sin akcepteble por si kaj sia kunvivantaro?), scienca demando (kiel psikologo povas lerni necesojn por solvi tian problemon?) kaj komunika demando (kiaj informoj devas atingi vastan publikon por antaŭzorgi kaj aranĝi la koncernan problemon?).

## Psikologoj de la Mondo

La organizaĵo Psikologoj de la Mondo (PDM) estas fondita por kuniri, en Francio kaj aliloke, kun personoj, kiuj deziras konsulti por solvi problemojn, kiujn starigas ilia mensa kaj rilata vivo aŭ por plibonigi sian laboron ĉe homoj baraktantaj kontraŭ tiaj problemoj. En Francio temas ekzemple pri „senpape-ruoloj” (homoj sen legitimiloj); familianoj de Alzheimer-malsanulo; sociaj fakuloj, kiuj kontaktiĝas kun senhejmuloj en la stratoj de urboj. Aliloke, ekzemple pri inaj viktimoj de edza violento en Kabilio, togolaj rifuĝintoj en Ganao, voluntuloj en Palestino ...

## Rethelpo? Diskutindaj artikoloj?

Konsiderante la karakterizaĵojn de la esperantista komunumo, PDM ŝatus scii, ĉu estus oportune malfermi retkonsultojn. La opinioj diverĝas: ĉu tiu propono renkontus sufiĉan intereseon? Ĉu estas psikologiaj problemoj – klinikaj, sociaj, interkulturaj – kiuj gravas por la legantaro de MONATO?

Skribu viajn demandojn, sugestojn, komentojn kaj proponojn al [pdm.esperanto@psychologuesdumonde.org](mailto:pdm.esperanto@psychologuesdumonde.org).

Kiss Adam



# Kelkaj meditoj rilate al la „porka” gripo

**L**a 11an de junio Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) atribuis al la nuntempa epidemio de „porka” gripo aŭ pli ĝuste al la gripo AH1N1<sup>1</sup> la plej altan, tio estas la sesan, nivelon (fazo 6). Do, la epidemio disvastiĝis preskaŭ en ĉiuj kontinentoj, t.e. jam okazis pandemio: kreskinta kaj daŭrinta transmisio de la infekto inter homoj. Antaŭ nelonge la variaĵo de la gripviruso A de subtipo H1N1, kiu kaŭzis la nuntempan pandemion, estis nomita oficiale „California 042009”. En 76 landoj jam estas registritaj ĉirkaŭ 162 000 malsanuloj, el kiuj 1150 mortis (en Meksiko pli ol 100). Fakte temas pri la unua pandemio de infektmalsano en la 21a jarcento kaj la dua post aidoso, kiu disvastiĝas ekde la 80aj jaroj de la 20a jarcento. La lasta tre grava pandemio de gripo, AH3N2 („honkonga gripo”), okazis en 1968, kiam malsaniĝis ĉirkaŭ du miliardoj da homoj, el kiuj multaj mortis. Al ĝi antaŭis en 1957 preskaŭ simile vasta pandemio de gripo, sed kaŭzita de la viruso AH2N2, kiu estis nomita „azia gripo”.

La nuntempa epidemio de „porka” gripo komenciĝis en aprilo de 2009 en Meksiko. Ĉar oni suspektis, ke la fonto de unuaj infektadoj de homoj estis porkoj, la malsano dekomence estis nomita „porka” gripo. La nomo „porka” gripo jam delonge estis konata al epidemiologoj. Ekzemple, jam en 1976 en Nov-Jerzejo (Usono) porkoj estis la fonto de gripo por multaj militservantoj. Sed porkoj povas prezenti danĝeron en aliaj rilatoj. En la ĉeloj de la trakeo kaj la bronkoj de porkoj povas sukcesi

multobliĝi ne nur la propraj (porkaj) gripaj virusoj, sed ankaŭ tiuj de homoj kaj birdoj. Inter iliaj genaj fragmentoj povas okazi interŝanĝoj kaj rezulte de tio naskiĝas kunmetitaj virusoj, kapablaj kaŭzi vastajn epidemiojn.

En la komenco, la kvara nivelo estis atribuita al la epidemio de „porka” gripo laŭ la klasifikado de MOS, ĉar la epidemio estis lokalizita, kaj la intenseco de transmisio de gripvirusoj ne estis tro granda. Sed en la fino de aprilo MOS atribuis al la epidemio la kvinan nivelon, ĉar la malsano jam estis registrita ne nur en Meksiko, sed ankaŭ en Usono kaj en multaj aliaj landoj, kaj klariĝis, ke gripvirusoj aktive transmisiĝas inter homoj. Laŭ decido de MOS, la malsanon oni ĉesis nomi „porka” gripo, sed gripo AH1N1.

Estis ellaboritaj ekstremaj preventaj rimedoj: la rigora izolado de infektitoj kaj de ĉiuj suspektitoj kaj la observado de personoj, kiuj estis en kontakto kun malsanuloj. Krome, oni kontrolis ĉiujn alvenintojn el regionoj, kie estis registritaj malsanuloj, oni mezuris la temperaturon helpe de senkontaktaj termometroj, estis amasa portado de defendaj maskoj ktp. Por kuracado de la malsanuloj oni komencis uzi efektivajn kuracilojn: oseltamivir (Tamiflu) kaj aliajn, kio forte malpligrandigis la mortecon. En Meksiko je la fino de majo oni denove malfermis restoraciojn, kinejojn ktp. Sciencistoj aktive okupiĝas pri ellaborado de specifa vakcino.

Tamen en la mondo la malsano daŭre disvastiĝas. Eĉ en malproksimaj regionoj, ekzemple, en Aŭstralio, dum ►

YASER ALGHOFILY





*Por kuracado de AH1N1-infektitoj oni komencis uzi efektivajn kuracilojn, Tamiflu kaj aliajn, kiuj forte malpligrandigas la mortecon.*

►unu semajno la kvanto de malsanuloj kvarobliĝis. Tre gravas, ke oni prognozu la estontan evoluon de epidemio. Nelonge estis eltrovite, ke en genaro de la variaĵo de gripviruso AH1N1, kiu kaŭzas la pandemion, enteniĝas genoj de gripvirusoj de birdoj, porkoj kaj homoj. Ekzistas ankaŭ la danĝero de malfavoraj mutacioj de tiuj virusoj aŭ de iliaj rekombinadoj kun aliaj gripvirusoj. Verŝajne tio okazis en 1918, kiam estiĝis la plej danĝera gripviroza pandemio.

Ĝis nun ne estas kompreneble kial en 1918 kaj 1919 disvastiĝis tia terura gripviroza pandemio (misnomita „hispana gripo”), kiam malsaniĝis triono de la mondloĝantaro kaj mortis pli ol 20 milionoj da homoj. Tiam la loĝantaro ne havis iun ajn imunecon al tiu viruso, kiu transisiĝis aergute. Al la pandemio kontribuis mondmilita ĥaoso kaj grandaj migradoj. Tiam ne estis ellaboritaj efektivaj preventaj rimedoj kaj forestis la necesaj kuraciloj. La pandemio estis kaŭzita de gripviruso AH1N1, t.e. de la sama subtipo de la viruso, kiu kaŭzis la nuntempan pandemion, sed, verŝajne,

de alia variaĵo. Antaŭnelonge danke al la sveda patologoanatomio J. Hultin estis ricevataj specimenoj de pulma histo de inuita virino, mortinta pro gripo en 1918 (la kadavro konserviĝis en kondiĉoj de eterna glacieco en Alasko). La usonaj sciencistoj J. Taubenberger kaj kunlaborantoj eligis la viruson el tiuj specimenoj kaj rekonstruis ĝian genaron. Ili komparis ĝin kun la genaro de la viruso de birda gripo H5N1 kaj supozis la versimilajn kaŭzojn de la alta maligneco kaj de aerguta transigo de la viruso de „hispana gripo”. La gripviruso de 1918 havis diferencojn kompare kun la birda gripviruso H5N1 en la strukturo de iuj aminoacidoj kaj tial pli facile kunligiĝis kun receptiloj de homaj ĉeloj. Krome la viruso de 1918 blokadis la homan interferonon (kontraŭviroza proteino en organismo) kaj tial disvastiĝis laŭ la tutaj spirvojoj kaj pli facile transisiĝis aergute. Sed ankoraŭ restas ne klaraj la naturaj portantoj de la viruso. Oni povas proponi, ke tiuj estis porkoj, en kies ĉeloj okazis rekombinado de gripvirusoj de birdoj, homoj kaj porkoj. Deĉifrado

de la kaŭzoj de la „hispana epidemio” tre gravas por efektiva prognozo de nuntempaj kaj estontaj gripvirusaj epidemioj. Verŝajne ekzistas malgranda kruca imuneco al diversaj variaĵoj de la sama subtipo de gripaj virusoj, kio almenaŭ iomete retenas la disvastiĝon de la nuntempa pandemio kaj mortado pro ĝi.

## Konkludo

La epidemio de gripo AH1N1 do daŭras. Efektivaj vakcinoj povas aperi plej frue dum aŭtuno 2009. Pro ofta variemo de la gripviroza strukturo necesas konstante ŝanĝi antigenajn kunmetaĵojn en vakcino. Tre gravas krei efektivajn kaj ne multekostajn kuracilojn atingebajn por la loĝantoj de malriĉaj landoj. Naturaj rezervujoj de gripvirusoj – diversspecaj bestoj – estas grandegaj. La kvanto de rekombinadoj de virusoj estas preskaŭ senfina. Mutacioj ne estas prognozataj. Necesas ĉirkaŭbari porkbredejojn kontraŭ kontakto kun birdoj. Tre gravas konstante kontroli birdojn kaj porkojn cele al evidencigo de gripvirusoj, kio permesas ĝustatempe malkaŝi kaj preventi epidemiojn de gripo. Same necesas regule esplorkontroli la laboristojn de pork- kaj bird-bredejoj. Tre gravas havi tutmondan sistemon de senprokrasta reagado. Oni povas opinii, ke se tio estus efektivigata, la gripviroza „porka” epidemio ne estus trafinta nin neatendite. Certe, por tio necesas grandaj monrimedoj. Sed haltigi jam disvastiĝintan pandemion estos pli multekoste.

**Vladimir LEMELEV**

1. La akronimoj H1N1, H2N2, H3N2, H5N1 ktp koncernas du proteinajn substancojn (antigenojn) en la supraĵa kovrilo de la gripviruso: hemaglutininon kaj neŭraminidazon. Ĉe la virusoj de gripo A de homo kaj bestoj ekzistas 15 tipoj de hemaglutininaj (ilin oni markas per litero H kaj numeroj 1 ĝis 15) kaj 9 de neŭraminidazoj (litero N kaj ciferoj 1 ĝis 9). Ĉe gripvirusoj povas renkontiĝi diversaj kombinaĵoj de ĉi tiuj proteinaj substancoj.



# Paŝo al energia sendependeco



**Registaraj reprezentantoj de kvar EU-landoj (Aŭstrio, Hungario, Rumanio kaj Bulgario), Turkio kaj Eŭropa Unio subskribis la 13an de julio 2009 en la turka ĉefurbo Ankaro interkonsenton pri la konstruo de strategie grava gasodukto *Nabucco* ([www.nabucco-pipeline.com](http://www.nabucco-pipeline.com)), kiu preterpasos Rusion. Ĝi devas malpliigi la dependecon de Eŭropo de la rusa gaso. La celo estas konstrui gastubon 3300 km longan tra la menciitaj landoj ĝis distribua centro en orienta Aŭstrio, tra kiu ekde 2014 estos transportata gaso de Azio al Eŭropo. La konstruado kostos 7,9 miliardojn da eŭroj kaj devas komenciĝi en 2011.**

**I**nciatinto de la projekto estas la aŭstra entrepreno OMV. Kunpartoprenantoj estas MOL (Hungario), *Transgaz* (Rumanio), *Bulgargaz* (Bulgario) kaj BOTAŞ (Turkio). Sesa partnero, ekde februaro 2008, estas la germana RWE. Politika konsilisto de la projekto estas Joschka Fischer, eksa germana ministro pri eksterlandaj aferoj.

Eŭropa Unio subtenas la konstruon de la gasodukto, kaj ankaŭ Usono ple-dis por ĝi. La gastubo en la unua fazo devus ĉiujare transporti 10 kaj poste 31 miliardojn da kubaj metroj da gaso. Rusio antaŭenpuŝas konkurencan projekton *Suda fluo* por liveri rusan gason al Eŭropo. Ekspertoj timas, ke neniu el la du gastuboj estos profitiga, ĉar jam ekzistas aliaj. Plia konkurencan projekto estas *Norda fluo*, tra kiu oni transportos rusan gason tra la Balta Maro al Germanio (MONATO, 2006/1).

## De kie fluos gaso por *Nabucco*?

La ĉefa problemo de *Nabucco* estas kontrakti kun pli da liverontaj landoj.

La partoprenantaj entreprenoj deklaris, ke ili ricevis promesojn pri gasliveroj el Azerbajĝano, norda Irako kaj Turkmenio. Certaj promesoj tamen preskaŭ


ne estas, ĉar ankaŭ Ĉinio, Pakistano kaj Barato havas grandan interesiĝon pri gasliveroj.

Ĉi-momente certa liveranto estas nur Azerbajĝano. Tamen la liveroj el tiu lando ne sufiĉos por plenigi la kapaciton de *Nabucco*, ĉar la lando povas certigi jare nur kvar miliardojn da kubaj metroj. Turkio deziras, ke ankaŭ irana gaso fluu en la gastubo al Eŭropo, se la politikaj kondiĉoj permesus tion. Irano posedas la due plej grandajn gaskuŝejojn en la mondo. Usono tamen estas strikte kontraŭ negocoj kun Tehrano pro la disputo lige kun la irana atombprogramo. Alia ebla partnero estas Turkmenio.

José Manuel Barroso, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, deklaris, ke la ►

*Registaraj reprezentantoj de kvar EU-landoj (Aŭstrio, Hungario, Rumanio kaj Bulgario), Turkio kaj Eŭropa Unio subskribis la 13an de julio 2009 en la turka ĉefurbo Ankaro interkonsenton pri la konstruo de strategie grava gasodukto *Nabucco*.*





La plano de la gasodukto Nabucco, kiu preterpasos Rusion, estas strategie grava.

► gastubo kontribuos al la energisekureco de Eŭropo kaj Turkio. Ĝi malfermos ankaŭ la pordon por nova erao en rilatoj kun Turkio. La turka ĉefministro Recep Tayyip Erdoğan karakterizis la politikan

interkonsenton pri la gasodukto kiel historian momenton por la energia sekureco en Eŭropo. La deklaro de la sveda prezidanteco de la EU-Konsilio tekstis, ke la plibonigita liversekureco estas strategie

grava por EU. Plie oni substrekas, ke la funkcia eŭropa energimarkato devas variigi la provizadon per brulaĵoj kaj transportvojoj.

## Avantaĝo por Turkio

La subskribado de la interkonsento malfruiĝis monatojn pro la postuloj de Turkio pri malmultekostaj liveroj de gaso je specialaj kondiĉoj. Fine ĝi rezignis pri tio kaj reagis kompromise. Ĝi ne plu insistas havi 15 procentojn de la transportata gaso. Aliflanke, Turkio okaze de krizo volas havi aliron al la eŭropaj gasrezervoj. Oni akceptis tion, kaj la gasodukton oni konstruos tiel, ke gaso povas flui en ambaŭ direktoj. Do, Turkio tiuokaze povus importi gason ankaŭ el Alĝerio kaj Norvegio. Turkio opinias ricevi jare ĝis 150 milionojn da eŭroj da enspezoj rezulte de la gastransito.

EVGENI GEORGIEV

## BELGIO

# Plimultiĝis dungeblecoj

Pro la informoj de la komunikiloj pri tensioj inter la du belgaj lingvokomunumoj, oni eble ekhavis la impreson, ke en Belgio ĉio stagnas. Tamen, malgraŭ la internaj problemoj, la lando ankoraŭ funkcias kaj en freŝdata raporto de Eŭropa Unio (EU) estas kelkaj esperdonaj informoj.

**F**ine de marto 2009 la kvanto de laborpostenoj estis je duona procento pli alta ol en marto 2008. Belgio estis unu el malmultaj landoj, kie tio okazis. Mezume en EU ĝi falis je 1,3 %.

En la unua kvarono de 2009 malaperis 0,2 % de la laborpostenoj en Belgio, sed tio estis pli bona ol la cetero de la Unio, kie estis falo je 0,9 %. El la grandaj ŝtatoj nur Germanio ne montris konsiderindan perdon de poste-

noj. En ambaŭ landoj la entreprenoj provas eviti maldungojn ĉie kie eblas.

La EU-raporto krome mencias, ke la senlaboreco inter majo 2008 kaj majo 2009 kreskis je 2,1 %, sed en Belgio nur je 1,6 %. Kontraŭe la ciferoj de junulara senlaboreco en Belgio montras pli malbonan rezulton ol la eŭropa mezumo.

Ivo DURWAELE

# Ŝparemaj belgoj

En la unua jarduono de 2009 la monkvanto en ŝpardeponoj de Belgio nekutime kreskis je 11 %. Fine de junio la tuta kvanto atingis 172,5 miliardojn da eŭroj, absolutan rekordon por Belgio.

**Ŝ**pari pli grandan parton de siaj enspezoj estas tendenco en la landoj, kiuj uzas eŭron. En la unua kvarono de 2009, en tiu zono oni ŝparis 15,6 % de la enspezoj, sed en Belgio eĉ 15,8 %. Tio estas kresko je 1,8 % por la eŭroregiono kaj 2,7 % por Belgio kompare al la unua jarkvarono de 2008.

El la statistikoj de Eŭropa Unio (*Eurostat*) videblas, ke Belgio plej kontrastas kun Britio, kie oni nuntempe elspezas proksimume ĉion, kion oni perlaboris.

Ivo DURWAELE



# La mondrevolucia verko finfine en Esperanto

**L**a limo inter la 1850aj kaj 1860aj jaroj ludis en la historio de la natursciencoj elstaran rolon, laŭ la denseco de la eventoj. (Kun ĝi kompareblas, ŝajne, nur la jaroj ĉirkaŭ 1900.) Tiu-tempe estis kreita bazo por ĉiuj sekvaj komune akcepteblaj kemiaj teorioj (atom-molekula teorio, dum la kongreso de kemiistoj en Karlsruhe), statistika fiziko kaj elektrodinamiko, kies bazoj estis konstruitaj ĝuste en tiuj jaroj fare de Maxwell. Ni aldonu al la natursciencoj la unuan skizon de la nova teorio en la politika ekonomiko de Marx (1859), por ke oni komprenu, ke la homa penso ĝenerale travivis en tiu historia momento revoluciajn ŝanĝojn, kaj la mondo fine de la 1860aj aspektis por la homaro (almenaŭ por ties pensanta parto) tute alie, ol jardekon pli frue.

Sed en tiu revolucio de la mondkoncepto absolute elstaran rolon ludis la revolucio en biologio, kiun oni prave ligas kun la nomo de Charles Darwin, aŭ, en esperanta transskribo, Karolo Darvino. Ekde la 24a de novembro de 1859, kiam la unuaj legantoj malfermis la libron *Pri la origino de specioj per natura selekto, aŭ la konservo de favorataj rasoj en la lukto por vivo*, ili ekvivis en la mondo, kie la specioj transformiĝadis unu en alian sub influo de materiaj faktoroj sen ajna mistiko, la homo mem ricevis absolute firmajn radikojn en la mondo de la animaloj, kaj simileco inter morfologiaj strukturoj, fetoj, vivmanieroj, kemia konsisto ktp de diversaj vivestaĵoj ne plu bezonis por sia klarigo iujn idealajn arĥetipojn kaj similajn metafizikajn entojn. (Kvankam artikoloj de A. Wallace kaj Darvino pri la natura selekto aperis jam en aŭgusto 1858, ili estis nur *anonco* de teorio, kiun oni komencis atendi, sed

kiu, antaŭ la apero de la libro, la scienca revolucion ankoraŭ ne komencis.) Teleologio – kaj kune kun ĝi teologio – estis definitive por ĉiam ekzilita el la scienco kaj trovis la lastajn rezervejojn en pure ekleziaj organizaĵoj. Eĉ tiuj, kiuj pro diversaj personaj kaŭzoj ne povis kaj ne povas akcepti la ĉefajn tezojn de la evoluteorio entute aŭ almenaŭ en ĝia darvina varianto, ne povas ĝin ne konsideri. Tiu ŝanĝo en la mondpercepto de la homaro kompareblas laŭ sia skalo nur al tiu, kiun faris siatempe Koperniko. Kaj estonte al tia mensa revolucio povos komparebli, laŭ mia imago, nur du eventoj: kontakto kun alidevenaj raciaj estaĵoj kaj akcepto en la tuta mondo de la komuna neŭtrala lingvo.

## Epokfara libro

Tial apero de la epokfara libro en Esperanto en 2009 – la jaro de la 200-jara datreveno de Darvino kaj 150-jara datreveno de lia ĉefa libro – kaj samtempe 150-jara datreveno de Zamenhof – estas simbola kaj logika afero, finfine proksimiganta du altajn atingojn de la homa penso.

Ekzistis pluraj evoluteorioj, kaj antaŭ Darvino, kaj post li (plejparte fare de tiuj, kiuj ne povis konsenti kun la ĉefaj evolufaktoroj – heredo, variado, lukto por vivo – kaj sekvanta el ili natura selekto), sed la unuaj ne sukcesis fari renverson en la cerboj de sciencistoj nek de la ĝenerala publiko, kaj la duaj – ŝanceli rapide establiĝintan pozicion de darvinismo kiel ĉefa kaj centra komuna teorio por ĉiuj biologiaj sciencoj. Kial? La kaŭzoj estas diversaj. Unue, certe, „kulpas” la ĝustaj metodologiaj principoj de Darvino, kiuj absolute superis la princi-



pojn de ĉiuj ceteraj aŭtoroj de alternativaj teorioj, kiuj, ĉu eksplike ĉu implicite, lasis en siaj klarigoj de evoluo spurojn de teleologio aŭ/kaj allason de nemateriaj faktoroj (temas pri diversaj formoj de lamarkismo, ortogenezo, nomogenezo, kaj pluraj aliaj *ismoj* kaj *genezoj*). Rezulte, ĝis nun darvinismo estas modelo de tio, kiel necesas krei sciencajn teoriojn ĝenerale. Due, ĉar darvinismo fariĝis vera kerno de la scienc-esplora programo (en la senco de I. Lokatos), kiu funkcias dum 150 jaroj, kaj danke al kiu aperis pluraj novaj esplorkampoj en biologio (interalie genetiko kiel scienco pri heredo, ekologio, kiel scienco pri lukto por vivo, apartaj esplorkampoj kiel evolua fiziologio, evolua biokemio, ktp). Trie, sed tre grave, por ke darvinismo estu rapide akceptita kaj de la scienca komunumo kaj de la ĝenerala klera publiko – estis la stilo de Darvino. Oni ►



## La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen,  
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00  
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net)  
skajpe fel-monato  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

► ofte forgesas, ke tiu pure scienca libro estas samtempe brila literatura verko, kiu karakterizas ankaŭ aliajn verkojn de li. Pruvo de tio estas interalie la fakto, ke lia *Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo sur la ŝipo Biglo* estas legata ĝis nun kiel bona specimeno de beletraĵoj pri vojaĝoj, kaj ĝin volonte legas eĉ infanoj. Certe, „Darvino-literaturisto” estas aparta temo, sed ĝi tre gravas por pritakso de la traduko.

### Kvazaŭ Darvino mem ĝin verkus

La tradukinto Klivo Lendon, tamen, plendas pri la darvina stilo. Nu, mi supozas, antaŭ ol li komencis la tradukan laboron, tiajn pretendojn li ne havis, sed enprofundiĝo en la tekston ĉiam elvokas malfacilajn problemojn. Ĉiuokaze, mi povas lin nur laŭdi: la libro legatas leĝere kaj atentokapte, kvazaŭ Darvino mem ĝin verkus en la internacia lingvo. Mi povus alkroĉiĝi al apartaj vortoj kaj vortoformoj, kiujn uzas la tradukinto (evito de la litero *h*, uzo de *nelaboristo* anstataŭ *virabelo*, ...), aŭ al vana, laŭ mi opinio, trouzo de la sufikso *-ad-* (*selekta-do*, *variado* tie, kie plene sufiĉus *selekto*, *vario(j)*), sed mi ne faru: finfine, tio estas pli afero de gusto, sed ne malĝusteco de la traduko, kiun oni entute povas konsideri modela. Des pli, mi tre ĝojas, ke Klivo Lendon tiom bone komprenas kaj aplikis tiajn fajnaĵojn, kiuj ekzistas en Esperanto, sed ne ekzistas en la angla, kiel diferencoj inter *adapto*, *adaptiĝo* kaj *adaptaĵo*, *vario* kaj *variado*, kaj similaj.

Specialan laŭdon el la vidpunkto de historiisto de la sciencoj elvokas la originala teksto, de kiu estis farita la traduko. La libro dum la vivo de Darvino estis eldonita oficiale (ja estis ankaŭ pirataj eldonoj!) en la angla lingvo 6-foje, la lastan fojon en 1872, kaj la aŭtoro, pro kritiko de la amikoj kaj pro evoluo de la scienco, iom korektadis la tekston de eldono al eldono. Oni kutime faras tradukojn al aliaj lingvoj el la lasta dumviva eldono, reviziita de la aŭtoro, kiel „la plej perfekta”. Tamen, unue, kelkaj korektoj ne nepre plibonigis la tekston. Due, tiuj, kiuj ja plibonigis laŭ tiama kurado de sciencaj imagoj, ne ludas por ni,

post 150 jaroj, principan rolon. Do, trie, por imagi, kiu konkreta teksto ja faris en la historio de biologio kaj ĝenerala homa penso la grandegan revolucion, nuntempe al ni estas pli interese havi submane ĝuste ĝin. Tial elekto por esperantigo de la unua eldono estas tre inĝenia solvo, kiu montras fajnman komprenon de Lendon pri la historio. Jen malgranda ekzemplo de la loko, kiu ekzistas en la unua eldono, sed malaperis, pro konsiloj de R. Owen, ĉar ĝi al li ŝajnis kruda kaj miskompreniga (Darvino obeis la konsilon, sed en leteroj ĝis la fino de la vivo esprimis malkonsenton kun ĝi):

*En Norda Ameriko la nigra urso estis observata de Hern (Hearne) naĝanta dum horoj kun larĝe malfermita buŝo, tiel kaptanta, kiel baleno, insektojn en la akvo. Eĉ en tiom ekstrema kazo kiel ĉi tiu, se la provizo de insektoj estus konstanta, kaj se pli bone adaptiĝintaj konkurencantoj ne jam ekzistis en la lando, mi vidas nenian obstaklon, kial raso de ursoj ne fariĝus, per natura selektado, pli kaj pli akvema laŭ strukturo kaj kutimoj, kun pli kaj pli granda buŝo, ĝis la produktiĝo de vivaĵo tiom grandega kiom baleno.* (p. 174) Ekzemple, en ĉiuj rusaj tradukoj tion tralegi maleblas.

Do, restas nur gratuli la tradukinton pro granda sukceso kaj nian tutan komumon pro la eblo tralegi tiun elstaran libron en la plej konvena por ĝi lingvo. Mi persone dankas la tradukinton kaj la eldoninton Flandra Esperanto-Ligo pro la preteksto denove tralegi la libron kaj ĝui la altan elanon de la genia homa penso.

Kaj laste. Tiu ĉi eldono malkovras la serion „Scienca penso”. Restas nur deziri al FEL daŭrigi la serion per same gravaj kaj bonkvalitaj libroj.

Nikolao GUDSKOV

Karolo Darvino: *La Origino de Specioj*. Eld. FEL, Antverpeno, 2009. 431 paĝoj broŝuritaĵ. ISBN 978 90 77066 409 9.

**Prezo de la broŝurita versio ĉe FEL: 24 eŭroj + afranko.**  
**Prezo de la e-libro ĉe FEL: 14,40 eŭroj.**



## anoncetoj

Sur Interreto aperis **La Teorio pri Ĉio**, vivoverko de Manuel Halvelik, je la adreso [www.sotragogismo.net](http://www.sotragogismo.net). Ĝi estas senpage elŝutebla, sed ege ampleksa.

La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

**Vizitu Ipernity**, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 2000 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al [www.ipernity.com/?lg=eo](http://www.ipernity.com/?lg=eo) Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

## MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

[lagazeto@osiek.org](mailto:lagazeto@osiek.org)

<http://www.lagazeto.com>

# Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998  
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)  
provizora retpaĝo:  
[www.Komencanto.narod.ru](http://www.Komencanto.narod.ru)

Poŝta adreso:  
KOMENCANTO,  
pk 132, Ekaterinburg,  
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj  
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.  
Abonu ĉe UEA aŭ  
ĉe via landa peranto



**enciklopedieto  
kun informoj kiel  
telefoni el kaj al  
eksterlando**

**POŜKALENDARO**

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

**ENCIKLOPEDIETO**

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

# La Jaro 2010

**via poŝamiko dum la tuta jaro 2010**



**Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen  
[www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)**

**Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun  
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)**